



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9/10  
1969

**ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO**  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo  
35-a (40-a) jaro  
Monata

## ROBOPO 75 - JARA

Unu el nial plej diligentaj pioniroj, emerita kapitano de infanterio, *Rolf Eigil Bugge-Paulsen*, fariĝos 75-jara la 11an de decembro 1969.

Bugge-Paulsen naskiĝis en Bergen en 1894, kaj li esperantistiĝis jam en 1907, kiam li havis nur 13 jarojn. Li unue trastudis la malgrandan ŝlosilon kaj poste tralegis la lernolibron de Skeel-Gjörling.

Dum sia 62-jara esperantisteco li faris meritoplanan laboron por la Esperanto-movado en Norvegujo. Sed tie ĉi ni povas mencii nur la ĉefajn trajtojn:

Bugge-Paulsen estis prezidanto de NEL 1919—34 kaj 1937—47, komitatano A de UEA 1922—62, ano de la Ekzamena Komisiono de NEL 1921—41, ano de Lingva Komitato (nun Akademio de Esperanto) de 1932. Li restarigis Norvegan Esperantiston en 1922 kaj estis ĝia redaktoro aŭ kunredaktoro 1922—24 kaj 1932, kaj li estis komisiito de NEL pri radio

kaj interŝtataj organizaĵoj. Ĝis nun li partoprenis ĉ. 20 Universalajn Kongresojn, el kiuj la plej multajn kiel reprezentanto de la Norvega Registaro.

Li faris sennombrajn paroladojn por Esperanto kaj gvidis multajn kursojn, i. a. 7 en Svedujo. Li ankaŭ gvidis la unuan Esperanto-kurson per radio en Norvegujo 1928—29, kaj en 1930 li preparis la kurson de Andreo Cseh ĉe la universitato en Oslo. Li ankaŭ fondigis klubon inter la polisticoj en Oslo en 1931.

Bugge-Paulsen verkis aŭ eldonigis plurajn propagandilojn kaj lernolibrojn, i. a. radiovortaron norvegan-Esperantan-anglan (1925—29), la 2an kaj 3an eldonojn de la norvega ŝlosilo (1934 kaj 1956), verkis la norvegajn prilaboraĵojn de la lernolibro de Seppik-Malmgren (1935, 1938, 1947 kaj 1955). Li ankaŭ redaktis konstantan radiorubrikon en la programrevuo «Radiobladet» (1932—40). Plue

Daŭr p. 117

## Facila paĝo

Her kommer et lett stykke for nybegynnere. Det er ekstra stor linjeavstand for at dere skal kunne skrive de norske ordene over. Ordene finnes i Nøkkel til Esperanto.



Karaj novaj esperantistoj! Jen io por vi. Vi trovas ĉi tie simplan bildon. La bildo estas farita per strekoj. Kion montras la bildo? Ĝi montras viron, kiu portas manĝaĵon. Sur la kapo li havas altan ĉapon. Lia nazo estas longa. La

nazo estas sub la manĝaĵo. Li ne volas senti la bonan odoron. Li havas grandan apetiton, sed la manĝaĵo estas por la gastoj en la restoracio. La viro apartenas al la restoracio. Li preparis la manĝaĵon en la kuirejo. Ĉu vi vidas, ke la gastoj manĝos birdon? Kia estas la birdo? Ĝi estas granda. Ĉu vi konas tiun birdon? Ĝi estas ansero.

### LA KONTORFONDAĴO

|                     |              |
|---------------------|--------------|
| Pli frue .....      | kr. 1 228,35 |
| T. Nordeng .....    | » 4,00       |
| S. K. ....          | » 20,00      |
| H. D. ....          | » 17,50      |
| I. Skaugen .....    | » 5,00       |
| R. Bugge-Paulsen .. | » 60,00      |
| O. Øvsthus,         |              |
| T. Reisæter .....   | » 30,00      |
| B. Aandahl .....    | » 25,00      |
| C. S. B. ....       | » 10,00      |

Kr. 1 399,85

### LA FERVOJA

### TERMINARO

### NORVEGA-ESPERANTO, ESPERANTO-NORVEGA.

Vi povas mendi ĉe:

Odd Kolbrek,  
adr. Kaldbakkstubben 22,  
Oslo 9.

Vendprezo en Norvegio  
5 n. kr., eksterlande sam-  
valora kiel 1 U.S. dolaro.

## Norvega Esperantisto

### ESPERANTOBLADET

**Redakcio:** Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach.

**Adreso de la redakcio:** Hulderveien 17 B,  
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por  
manuskriptoj: la 20 en la monato  
antaŭ la apero.

**Abonprezo:** En Norvegujo kaj ekster-  
lando: n. kr. 8,—.

**Anoncprezoj:** 1/4 paĝo kr. 150,—,  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,  
1/8 p. kr. 19,—.

### BONDEZIROJ!

Okaze de la kristnasko kaj la nova jaro bonvolu akcepti niajn bondezirojn!

Samtempe koran dankon pro helpo, kontribuajoj, konsiloj, kritikoj!

### KOREKTOJ

En la raporto pri la norvega kongreso en n-ro 7 elfalis la 9a linio. La koncerna frazo devas teksti: Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estis Per Johan Krogstie, komitatanoj estis la ceteraj klubaj estraranoj. Alvenis pli ol 60 kongresanoj el Orienta, Okcidenta kaj Meza Distriktoj . .

En la sama n-ro, en la alvoko pri legantoj por blinduloj nia adreso estas erare indikita, sed kredeble ĉiuj nun scias ke la adreso de N.E.L. estas Boks 942 — Oslo 1.

En n-ro 8, paĝo 97, lasta linio de la unua kolono en la parentezo devas stari: *nemembro*, ne novembro!

Fine ni havas denove insignojn portebajn sur la vesto:

Blanka rondo kun verda stelo, 10 mm.,

kun pinglo . . . . . kr. 4,50

Sama, liliputa, 4 mm. » 3,50

Stelo kun vorto

ESPERANTO,

23 mm. kun broĉo

aŭ butono . . . . . » 3,50

Stelo kun blanka

rando, 21 mm.

kun broĉo aŭ butono » 3,50

*Esperantoforlaget A.s*

Boks 942, Oslo 1,

Poŝtgiro 100.31

### JUBILEOJ

La 3-an de novembro: S-ro Ernfrid Malmgren, prezidinto de UEA, honora prezidanto de UEA, 70-jara.

La 5-an de novembro: d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, 60-jara.

La 16-an de novembro: s-ro C. C. Goldsmith, multjara ĝenerala sekretario de UEA, 80-jara.

*Al ĉiuj postfeste niajn plej koran bondezirojn!*

### LA PROPAGANDA FONDAĴO

N. E. F. A. . . . . kr. 100,00  
(Pli frue erare notita sub la kontorfondaĵo.)

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

\*

## Sciigoj de N.E.L.

*Kursoj.* Jam estas tempo plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Kluboĵ, kiuj spite nian insistan alvokon, tamen ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas *nepre* aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniuj progresoj. Kaj ĉiuj kluboj ja devas progresi!

*Korespondaj kursoj.* Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,00; ambaŭ partoj kune: kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

*Prelegoj.* Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L.. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

*Taskotabelo por la kluboj.* — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi la kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A.. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

*Januaro:* La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkularporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pritraktas la jarraporton, kalkularporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

*La Liga Estraro.*

## LA TARIFOJ DE NORVEGA ESPERANTISTO

La Liga Estraro faris kelkajn ŝanĝojn en la anonc-tarifoj. De 1970 la prezo por  $\frac{1}{4}$  paĝo estos kr. 40,00, por  $\frac{1}{8}$  paĝo kr. 20,00. La ceteraj tarifoj restos senŝanĝaj.

Atentu ankaŭ ke abono en Norvegujo (por ne-membroj de N. E. L.) kaj eksterlande de 1970 estos n. kr. 12,00.

\*

### Kongreso 1971 en Londono

La 56a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la ĉef-urbo de Britujo, Londono. Tion anoncis antaŭ nelonge Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam. La Estraro de UEA decidis elekti Londonon post zorga konsiderado

de la kandidataj urboj. Tiel, en sinsekvaj jaroj, la Universalaj Kongresoj vizitis aŭ vizitos plej diversajn angulojn de Eŭropo kaj ankaŭ Amerikon. De la sud-okcidento (Madrid) al la nordo (Helsinki), de la nordo al la oriento (Vieno), de la oriento al la nord-okcidento (Londono), kaj fine per granda salto al la okcidenta mar-bordo de Usono (Portland, Oregon). Estas grave ankaŭ, ke la plej granda publika elmontriĝo de la Esperantomovado vizitos baldaŭ du landojn anglalingvajn. Tio signifas: porti la batalon en la tendaron de la malamiko — ĉar la angla lingvo estas evidente la plej granda konkuranto de Esperanto por la funkcio de internacia lingvo.

## La vizito de IBSEN en Budapeŝto

Nun min atentigis kelkaj eventoj pri la verkisto — ofte nomata la norvega giganto: IBSEN: nun estas sepdek jaroj, ke oni komencis ludi liajn dramojn en Budapeŝto, el kiuj mi povis vidi Peer Gynt Fantomoj/Reaperinto en la hungara Televido kaj nun mortis lia granda adoranto Henriko Hajdu, kiu dum duonjarcento ĉiujn liajn dramojn tradukis en hungara lingvo.

Por mi jam en mia juneco Ibsen havis grandan altirforton. Depost 1899 oni ludis liajn teatraĵojn en Budapeŝto. Unuafoje en 1899 la «Reaperintojn». Tiutempe oni pre-

zentis ĝin germane kaj ĝi ne havis la merititan sukceson. La gazetkritiko atentis ĝin, sed al la publiko ne plaĉis. Certe estis ia tro nova por ĝia aŭdaca voĉo kompare al la ĝistiamaj modaj, facilaj kaj supraĵaj dramoj de la eŭropa burĝaro. Sed poste gravaj estetikistoj kaj kritikistoj en revuoj kaj ĵurnaloj alvokis la atenton al lia verkaro kaj kiam en la sama jaro la hungara Nacia Teatro prezentis la verkon *Nora*, parto de la publiko jam akceptis ĝin favore. Nur poste fariĝis la atmosfero pli taŭga por la Ibsen-dramoj.

Kiam en 1891 Ibsen estis en

Vieno pro tiea prezentado de unu el liaj verkoj, li akceptis inviton al la hungara ĉefurbo, kio kaŭzis en literaturaj rondoj grandan ĝojon. Oni ja memoris, ke en 1849, kiam flagris la hungara liberecmilito kaj post heroa luktado kru-tele finiĝis pro supereco de la cara kaj la habsburga armeoj, Ibsen skribis entuziasman kaj laŭdan poemon pri tiu batalo de malgranda popolo kaj priploris la falon de la sankta afero.

Li alvenis al Budapeŝt la 19-an de aprilo 1891 kaj la hungaraj akompanantoj rimarkis, ke li bonege parolas germane, sed ŝatas spici siajn frazojn per francaj esprimoj.

Je lia honoro la Nacia Teatro prezentis la saman vesperon *Nora*. Ibsen rigardis ĝin el la loĝio de la direktoro. Tie li akceptis la entuziasman festan omaĝon de la publiko, sed poste li devis aperi sur la scenejo kaj — kio tiutempe estas malofta okazo — eĉ post malsuprenlaso de la teatra ferkurteno.

Li estis tre kontenta pri la prezentado kaj precipe pri unuaranga ludo de fama hungara aktorino. Li vizitis dum la sekvantaj vesperoj prezentadon en la Opero, dramon en la Nacia Teatro kaj pro lia speciala peto oni prezentis tie muzikan popolteatraĵon.

Dumtage li vizitis la vidindaĵojn de Budapeŝt — ili estis multe malpli, ol en la nuna tempo. En la Nacia Muzeo lin precipe interesis la memoraĵoj pri la menciita

liberecmilito. Li ankaŭ vizitis kolonion de pentristoj kaj skulptistoj kaj eĉ la *Petöfi* monumento li ekstaris kun deprenita ĉapelo, kun pia sento. Li amikiĝis kun la konata aŭtoro *Jókai* kaj partoprenis bankedojn. Ĉe la dua en la Redutpalaco — kie en 1929 okazis la Universala E. Kongreso! — eĉestis centsepdek verkistoj, artistoj, geaktoroj. Estas menciindaj la multaj diverslingvaj tostoĵoj, salutparoladoj: hungare, germane, norvege, latine kaj eĉ *-volapüke!* — Ja Esperanto ankoraŭ ne ekzistis.

Jen kelkaj frazoj el lia dankrespondo: «Jam estis antaŭ longa tempo — ĝi estas jam kvazaŭ sonĝo — kiam mian unuan poemon iu gazeto publikigis. Tiu poemo apostrofis la hungaran nacion. Min atingis la famo pri la batalo de popolo luktante por ĝia libereco kaj ni ekamis tiun fremdan popolon. Kaj nun, kiam mi estas sur hungara tero, mi pensas, ke mi vidas denove sonĝon. Tiu entuziasmo, tiu amikeco, kiun mi sperdas, estas kvazaŭ kara juniganta sonĝo! Multan dankon pro la afabla akcepto!»

Sed tiuj ne estis nur vortoj de ĝentileco. Ibsen estis vere kortuŝita. Georgo *Brandes*, la fama dana estetikisto post jaroj okaze prelege en Budapeŝt rakontis, kiel ofte parolis al li Ibsen pri la belaj tagoj en Budapeŝt. Kaj similajn memorojn hejmenportis la vizitantoj de la kongreso 1966!

Al mi plej multe plaĉis en miaj junaj jaroj — kaj ankaŭ nun —

la prezentado de *Peer Gynt*. Vere entuziasmigis min tiu juvelo de la mondliteraturo — kompareble kun *Faust* kaj la *Tragedio de l' Homo*. Avide mi legis ĝian tiutempan belan tradukon hungare.

Oni ripete montris ĝin kun aliaj Ibsenverkoj. Sed tiu restis la plej populara kaj en la lastaj jaroj la Nacia Teatro-ludis ĝin tre sukcese laŭ nova poezia traduko de fama hungara poeto Lajos *Aprily*. La sukcesa poeta interpreto estas trezoro ankaŭ de la hungara poezio! La ŝaton de Ibsen en Hungarujo pruvas, ke tiu estas jam la tria traduko de *Peer Gynt*! Kaj kiom mi ĝojis, kiam mi povis ĝin pro bonvola donaco legi en la majstra traduko en Esperanto. Pri Ibsen kaj pri *Peer Gynt* — laŭleginte el studo de J. H. Rosbach partojn — en

du budapeŝtaj grupoj mi prelegis. Tio estis mia omaĝo al la granda verkisto kaj al la norvega popolo. El liaj deklaroj en Budapeŝt mi citas ankoraŭ la interesan verkistan konfeson:

«Mi pensas ĉiam en drama formo. Al ĉiu atentita kaj travivita okazintaĵo mia pensado tuj donas dramatan formon. Mi skribas pli facile teatraĵon, ol studon aŭ eĉ leteron.»

Kaj el liaj adiaŭaj vortoj en Budapeŝt, kiuj sonas ankaŭ nun al ni ĉiuj:

«Ni estu solidaraj, ni ja estas realistoj kaj ni deziras resti realistoj. Sed tamen ĉiu iru sian propran vojan tiel, kiel tiu konformas al sia personeco. Ni kontenu en la evoluo, en la progreso . . .»

*Paŭlo Balkányi, Budapeŝt.*

## 55-a Universala Kongreso de Esperanto

Vieno, 1/8-1970

Alta Protektanto: D-ro Franz Jonas, Prezidento de Aŭstrujo.  
Konstanta Adreso: Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

### *Ĉarma ferioestadejo*

La 11a Internacia Infana Kongreseto, okazonta paralele kun la 55a UK en Vieno, akceptos la esperantlingvajn infanojn en ĉarma internacia kulturejo «Hörndlwald» (1130 Wien), kie ili disponos pri 20 ĉambretoj por 40 infanoj. Oni havos apartan domon, sed samtempe loĝos en aliaj domoj

libertempantaj infanoj. Tiel la infanoj estos inter si, sed ankaŭ en la publiko. En la apudaj parkoj troviĝas grandaj ludejoj, inkluzive infanan naĝbanejon. Pro la limigita nombro de akceptotaj infanoj frua aliĝo estas konsilinda.

### *Filmprezentadoj dum la 55-a UK*

Plenumante la deziron de multaj kongresanoj, la kongresorga-

nizantoj enprogramigos kelkajn filmprezentadojn al la kongresa programo. Kunlige al tio, ili petas ĉiujn Esperanto-instancojn, kiuj posedas prezentindan filmon kun esperantlingva teksto aŭ je konvena temo, aŭ scias pri tiu, komuniki kaj proponi tion al la LKK. Samtempe oni klopodu iniciati ĉe koncernaj (turismaj, naturamikaj, komercaj ktp.) entreprenoj eldonon de novaj filmoj en la Internacia Lingvo. (Noto: evitendaj estas filmoj ne neŭtralaj.)

#### TEJO kongresos en Graz

La 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en aŭstra urbo Graz unu semajnon post la UK, t.e. inter la 8.—15.8.70. Oni esperas, ke tiu ĉi novaĵo estos vaste publikigata kaj la junaj esperantistoj tra la mondo havos baldaŭ okazon por aliĝi. Adreso de la LKK estas ĉe S-ro Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010-Graz, Aŭstrujo.

#### Internacia Film-Konkurso

La Estraro de UEA kaj la LKK de la 55a UK anoncas internacian konkurson por filmamatoroj pri dokumenta filmo pri la 55-a UK en Vieno 1970. Formato 8 mm, daŭro maks. 30 min., laŭvole kolora aŭ nigre-blanka. Premioj ĝis 300,- gld plus filmmaterialo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

#### ILERA fondota?

Kvankam la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj

(ILERA) ankoraŭ ne estas oficiale fondita, diversaj ILERA-sekcioj sukcese agadas. La iniciatinto de ILERA, s-ro Rudolf Bartosch, kaj la aŭstra ILERA-sekcio kore invitas al fonda kunveno, kiu okazos dum la 55-a UK en Vieno. Celoj de ILERA estas i.a. starigi regulan Kongresan Stacion dum la UK-oj. En Vieno funkcios la Kongresa Stacio, muntota de s-ro Bugner OE 1 BKW. Radioamatoroj skribu al s-ro R. Bartosch OE 3 RU, A-3812-Gross Siegharts.

#### Allogaj premioj

Por la laŭreatoj de korespondakurso de Esperanto, organizita de s-ro P. Delaire (46 bis, bd. Alexandre-Martin, B.P. 901, 45-Orléans-Francujo) estas destinitaj tre allogaj premioj, inkluzive de senpaga restado kaj partopreno en la 55-a UK en Vieno 1970.

#### Favora reklamebleco

Por doni eblecon ankaŭ al Esperanto-eldonejoj kaj al la Landaj aŭ Fakaj organizaĵoj, la Loka Kongresa Komitato proponas reklameblecojn je reduktita prezo en luksaj kaj interesaj kongreseldonaĵoj, kiaj estos la Dua Bulteno kaj la Kongresa Libro de la 55-a UK (eldonkvanto po 3000 ekz.). Interesiĝantoj petu detalojn ĉe la konstanta adreso de la kongreso!

#### Ekzamena Komisiono

La Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn en Vieno okaze de la UK. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi

petu la informojn ĉe la Sekretario de IEK, s-ro J. C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S. W. 19, Britujo. Aldonu int. respondukuponon.

\*

Daŭr de p. 109

#### Robopo...

li tradukis esperanten la libron «La skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto» (1951) kaj preparas nun norvegan-Esperantan poŝvortaron.

En 1956 Bugge-Paulsen vizitis Strasburgon kiam la kultura komisiono de la Eŭropa Konsilantaro traktis Esperanton, kaj li estis konsilanto de Nordlanda Esperanto-komitato de 1960. Li ankaŭ kolektis membrojn por la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-jaro 1959 kaj proponantojn de UEA por la Nobel-premio.

En 1951 Bugge-Paulsen fariĝis Komandoro de la 2a klaso de PRO MERITO, kaj en 1965 Komandoro de la 1a klaso. En 1969 li elektiĝis Honora Membro de NEL.

La tuta norvega esperantistaro sendas plej sincerajn kaj varmajn gratulojn kaj bondezirojn al la jubileulo!

LKH

#### La rusa lingvo ĉe U.N.

En decembro 1968 Unuiĝintaj Nacioj akceptis, post vigla debato, la rusan lingvon kiel sian kvaran «laboran» lingvon. La kosto por

#### Grava noto

Pagontaj aliĝantoj kaj mendantoj bonvolu noti, ke pagante per banko aŭ bankĉeko, ili afable aldonu 1,- gld aŭ ekvivalenton por la bankkosto. Dankon!

la unua jaro proksimiĝos al unu miliono da dolaroj. La dokumentaro de UN nur pri tiu debato, en nur unu el la kvin oficialaj lingvoj, pezas preskaŭ du kilogramojn! En sia juli-aŭgusta numero, la revuo «Esperanto», post funda analizo de la dokumentaro, prezentas resumon de la debato kaj komentojn pri la evoluo de la lingva problemo ĉe UN.

#### Malmultekostaj diskoj sukcesis

Tre sukcesaj montriĝis la malmultekostaj popularaj diskoj, kiujn UEA eldonis en la lastaj jaroj. Precipe ŝatataj estas la disko de la nederlanda kantistino Ramona van Dalsem, «La Feliĉo», kun sep originalaj kantoj en Esperanto, kaj la prononc-instrua disko «Internacia Elparolo». Tiu lasta konsistas el facilaj legaĵoj prezentitaj de kvin personoj el kvin landoj, kiuj ĉiuj siatempe laboris en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam.

Cu feliĉo estas la plej granda sopiro de la homaro? Eble — en ĉiu okazo oni foraceti la unuan milon da diskoj «La Feliĉo» en nur kvin monatoj. Ambaŭ diskojn nun necesis jam la duan fojon represiĝi, kaj la eldonnombro jam atingis 4000 por «Internacia Elparolo» kaj 3000 por «La Feliĉo».



## FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,  
Kaldbakstuppen 22, Oslo 9

### Fervojaj fakesprimoj

Ordbok over jernbaneantrykk.  
Fervoja Terminaro. Eldonis  
Norvega Esperantista  
Fervojista Asocio.

Antaŭ mi kuŝas kajero kun kartonita kovrilo, al kiu estas fiksitaj la elpreneblaj, kaj tial renovigeblaj kaj interŝangeblaj, folioj, entute 89. La libro estas fotopresita laŭ maŝinskribita manuskripto, kiu estas malpligrandigita. Al nefervojisto, do laiko, estas amuze trafolumi la libron, kaj rigardi ĝis kia grado eĉ la propra lingvo estas fremda, kiam temas pri fakesprimoj, pri kies neceso oni havis neniun imagon. Des pli oni komprenas la neceson de la esperanto-lingva fakvortaro, ĉar la internacia kontakto inter fervojistoj grandparte dependas de tio. Kaj, se iam la internacia lingvo estu agnoskata inter fervojistaj aŭtoritatoj, ankaŭ la sekuro de la vojaĝantoj dependos de la interkomprenigo. Certe la opa fervojisto povus per sia lingvoscio provi mem krei la bezonatan esprimon en ĉiu okazo, sed tiel li ja ankaŭ riskus nekomprenon aŭ malkom-

prenon. La fakterminaro evitigas tian danĝeron, plifaciligas la kontakton, kaj antaŭenpuŝas la veran rekonon de la internacia lingvo.

La vortoj certe troviĝis antaŭe. Tiu ĉi terminaro uzas aliajn terminarojn kiel fonton, ĉefe la internacian terminaron *Lexique Générale des Termes Ferroviaires*, kiun eldonis la Internacia Fervoj-Unio, kaj la Fervoja Terminareto de Germana Esperanta Fervojista Asocio.

Por laiko ne estas eble kritiki la elekton de terminoj, nek la kvanton en la norvega lingvo, nek ties esperanto-poralelo. Sed la fervojistoj lasis al sperta esperantisto, inĝeniero Olav Rygg, la lingvan kritikon, kaj ni tial povas fidi je la nivelo. La tuta eldono atestas pri zorga kaj konsciencplena laboro, kiu postulis multajn horojn, kaj ni volas doni honoron al la du eldonantoj, Per Engen kaj Per Johan Krogstie. Samtempe ni ankaŭ devas honori la Norvegan Stat-Fervojon, sen kies helpo certe ne eblus eldoni tian libron en tiel malgranda lando al tiel limigita medio.

*Hans Amund Rosbach.*

### Internacia tendaro en Fredriksten

*Infanoj el 11 nacioj distris  
la Haldenanojn.*

Oni povas trankvile diri, ke la loĝantoj de la regiono havis bon sukcesan rendezuon kun la internacia infan-tendaro en Fredriksten fortikaĵo, kaj ni kredas, ke 1.000 homoj trovis la vojon al la libera scenejo en konekto kun la oficiala inaŭguro.

Antaŭ ol la diversaj delegacioj sin prezentis, la komandanto de la fortikaĵo, generalmajoro Rolstad, bonvenigis ilin al Fredriksten kaj Halden. Kvazaŭ sur rulanta rubando la delegacioj sursaltis la scenon, kaj ni emus scii, ĉu iam la fortikaĵo estis tiel kolorriĉa. Kaj kiel kutime la plej malproksimaj gastoj sin distingis per siaj vestaĵoj, — la koreanoj, japanoj kaj la guatemalanoj. Sed ankaŭ la italaj infanoj, en vestoj rekte el la Venecio de Shakespeare, vekis grandan atenton.

Sekvis dancado, kantado kaj ludo, kaj fine ĉiuj kantis la CISV-kanton. Estis infanoj el Italio, Anglujo, Pollando, Japanio, Koreo, Kanado, Guatemalo k.t.p.

La infanoj estis kunligitaj en grupoj po kvar, ĉiu konsistanta el diversaj nacioj, kiuj interkompreniĝis kiel «nur infanoj tion povas», uzante gestlingvon kaj okazajn komprenatajn vortojn. Sed mankis la komuna lingvo! Ĉe metoda kurso dum ekz. unu mona-

to kaj posta interkorespondado en Esperanto? Kvazaŭ tajlorita por la internacia lingvo!

Oni certe povus ricevi subvencion de diversaj instancoj por tia aranĝo. *H.Fr.*

## Norvega Kroniko

### Sarpsborg

La Urso regule kunvenas ĉiun duan ĵaŭdon. La klubo perdis la duonon de la membraro, ĉar niaj junuloj iris al siaj universitataj studoj. Ni nun rekrutas novajn membrojn, kiujn ni instruas.

En la Tago de UNO Johan Hammond Rosbach prelegis pri ILO, kiu ĵus vicevis la Nobel-premion, kaj la klubo sendis saluton al UNO kaj al ILO.

Cetere Rosbach legas ĉapitrojn el sia nova libro, kiu aperos en 1970.

### Oslo

4/9 69. La prez. John Berggreen diris memorigajn vortojn okaze de la forpaso de nia membro Otto Koren, kiu mortis la 4-an de aŭgusto — nur kelkajn tagojn post lia partopreno en la kongreso en Finnlando. Otto Koren ne multe diris, sed li multe laboris por nia movado, interalie li estis kasisto en la Oslo klubo dum multaj jaroj. La morto de Otto Koren estis granda perdo por la Esperantomovado en nia urbo kaj en nia lando. La prez. petis nin honori

la memoron de Otto Koren per unuminuta silento.

C. Støp-Bowitz memorigis la forpason de Kortega Konsilisto Hugo Steiner, elstara konata persono en la internacia Esp.-movado. Li estis la fondinto kaj direktoro de la Esperanto-Museo en Wien, en kiu li laboris ĝis li mortis 92 jarojn aĝa.

John Berggreen informis pri la aŭtunaj kursoj planitaj, lia agado en la skoltaj, militaj kaj maristaj organizaĵoj, kaj la reklamo en la Oslaj kinejoj, kiu komenciĝis la 22/9 en Soria Moria kaj poste montriĝos en ĉiuj kinejoj en Oslo.

La vespera programo komenciĝis per Kirsten Ek, kiu tre bele legis la poemon de d-ro Zamenhof «La Vojo», gvidilo por nia laboro, ŝi diris.

C. Støp-Bowitz raportis pri la UEA Kongreso en Finnlando, kiu okazis precipe en Otaniemi ĉe Helsinko kaj en la ĉefurbo mem. Partoprenis la kongreson proks. 2000 personoj el 32 landoj — inter ili 40 norvegoj. 92 japanoj ĉeestis. Rolf Bugge-Paulsen salutis de la Norvega Registaro kaj C. Støp-Bowitz de NEL. La prezidanto de UEA, profesoro Ivo Lapenna faris la festparoladon dum la Inaŭguro. La kongreso finiĝis per komuna kantado de la Esp.-himno «La Espero».

Kiel en antaŭaj jaroj ankaŭ ĉifoje C. Støp-Bowitz finis per kantado de ne-oficiala tre amuza raporto (parte honorigo al Kirsten Ek, kiu eminente aranĝis kaj prizorgis la bonfarton de la flug-

karavano al la kongreso). Marit Delor akompanis per piano, kaj si ankaŭ akompanis la komunan kantadon dum la kafopaŭzo. La tabloj estis bele ornamitaj per floroj donacitaj de Inger Richard.

15/9. 69. Otto Prytz rakontis pri la 25-a Junulara Esp.Kongreso en Tyresö, iomete sude de Stockholm. Partoprenis 120 delegatoj el 20 landoj, sed Otto Prytz estis la sola partoprenanto el Norvegujo, kaj li esprimis la deziron ke en venontaj jaroj ankaŭ aliaj norvegaj junuloj ĉeestu la TEJO Kongresojn.

Intermikse kun sonbend-eltiraĵoj li rakontis pri la diversaj eroj de la programo: interkonatiĝa vespero, inaŭguro, kongresa balo, elekto de «Fraŭlino Esperanto» (francino), ekskurso al Mariefred, oratora konkurso, teatra prezentado (amuza), demonstracio por Esperanto en Stockholm k.t.p. Ĉiujn fojon oni ankaŭ elektis «Fraŭlon Esperanto» (bulgaro). La prez. de UEA, profesoro Ivo Lapenna prelegis pri la Studenta Ribelo.

John Berggreen gvidis la 10-minutan lingvan instruadon en nova formo de 20 demandoj. Li faris demandojn pri la historio de Esperanto, kaj la ĉeestantoj respondis — tiel li kreis tre utilan dialogon.

2/10 69. La prez. John Berggreen deziris koran bonvenon al la kunveno, kaj referis cirkuleron de NEL dat. 10/9. 69 interalie pri

agadoj inter la skoltoj, soldatoj kaj maristoj, krome la propono de Elna Matland dum la jarkunveno de NEL pri vojaĝsekretario.

Inger Richard paroladis pri «La floroj en la ĝardeno aŭtuna». Ŝi ne nur rakontis pri la floroj, sed ankaŭ pri fruktoj, legomoj kaj preskaŭ ĉiuj kreskaĵoj en la ĝardeno, kaj ŝi montris multegajn specimenojn. La prelego estis ege interesa kaj ŝi rikoltis fortan kaj merititan aplaŭdon. La florojn, legomojn, sukajn, konfitaĵojn k.t.p. ŝi donacis al nia vespera lotumado.

Thor Magnus Carlsen prizorgis la divenkonkurson, kiu estis tre varia. John Berggreen kaj Rolf Bugge-Paulsen gajnis per 10 ĝustaj el 12 demandoj.

C. Støp-Bowitz raportis pri tre bona propaganda agado flanke de la Studenta Esp. Asocio en Blindern Universitato.

20/10 69. La ĉefpunkto de la programo estis prelego de C. Støp-Bowitz «Ĉu vi abonas . . .?» Li rakontis pri la ĉefaj pli interesaj kaj gravaj eldonaĵoj esperantlingvaj. Unue «Esperanto», la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, kaj la Jarlibro de UEA kun la adresoj de la amaso de delegitoj. «Heroldo de Esperanto» estas sendependa gazeto, kiu kuraĝas kritiki UEA, kaj aperas per 18—19 numeroj jare. Tibor Sekelj eldonas «Esperanto-gazeton», sendependan organon de IOE (Instituto por Oficialigo de Esperanto. UEA ankaŭ eldonas «La Prakti-

kon», la gazeton kiu instruas kaj amuzas, kiu direktas sin al novaj esperantistoj.

«La Monda Lingvo Problemo» estas 4-monata scienca revuo en diversaj naciaj lingvoj kun ampleksaj resumoj en Esperanto. Ĉiuj fak-organizaĵoj eldonas gazetojn, ekz. «Scienca Revuo», «La Mevo» (zoologia - ornitologia). La Norda Prismo» estas kultura eldonaĵo, en kiu J. H. Rosbach estas unu el la redaktoroj.

John Berggreen prezentis la lingvan instruadon en formo de dialogo — 10 demandoj variaj, interalie pri la traduko de la Biblio al proks. 1000 lingvoj, la oficialaj kaj laborlingvoj de UNESCO, kiom kostas la traduklaboro de la UNO organizaĵoj k.t.p.

*Raportis Harda Danielsen.*

### **Kristiansand**

Kristiansand Esperantoklub havis kunvenon 30/10 69.

La prezidanto, s-ro Reinertsen, bonvenigis nin per paroladeto pri la aŭtuno, la tempo por studado. Ni studu Esperanton kaj estu fidelelaj kunlaborantoj por la klubo!

La prezidanto raportis pri interparolo kun skolta estrarano. La skoltoj nuntempe jam havas tro multajn taskojn. Ili ne havas tempon lerni Esperanton. Eble poste.

Sinjorino Haŭge sprite rakontis pri vojaĝo al Palermo.

*B. V.*

**Bergen**

La Esperantoklubo de Bergen grandskale celebris sian 35 jaran feston la 1an de novembro. Grandskala ĉar ne nur gesamideanoj, sed veraj geamikoj el Odda, Haugesund, Sauda kaj Oslo partoprenis la feston.

Por memoro de la mortitaj membroj de la klubo parolis la prezidantino Åshild Birkenes, kaj post la silento ŝi bonvensalutis la ĉeestantojn.

Kristian Sivertsen legis la prologon, kaj sekvis «La Himno». Kjell Offerdal faris la festparoladon, kaj sekvis nia klubkanto «Inter la montoj», verkita de nia ĵus mortinta membro Johs. Jahren. Kristian Sivertsen faris paroladon por la virino, kaj poste ni kantis virinan kanton. Elsa Wærnor parolis por la viro, kaj sekvis «Por la viro». Kristian Sivertsen legis gratulleteron de nia Ligo. La prezidanto de la Okcidenta Distrikto, Steffen Kjetland parolis kaj salutis de la Distrikta estraro. S.ino Bendixen per bonelektitaj vortoj dankis pro la manĝo. Eminentia pianistino Marit Evanger ludis dum la festotablo.

Post interbabilada kaj muzika paŭzo, ni kolektiĝis en la salono, kie ni ĝuis kukojn kaj kafon.

Tri aktivaj membroj ekhavis la kluban ordenon kaj diplomon «Pro fidelo», nome Elsa Wærnor, Annemor Jæger Bye kaj Kristian Sivertsen.

Tri elokventuloj faris instigajn parolojn por la klubo kaj la movado, nome Elna Matland kaj

Johan Matland, Sauda kaj Olav Thormodsen, «Mara Vento» Haugesund, Evald Bendixen, eminenta parolanto, rakontis amuzajn blagojn kaj historietojn.

Åshild Birkenes kaj Doris Birkelund donis al la klubo la libron Kalevala, kaj ges-roj Martha kaj Kjell Offerdal donis al la klubo prezidantmarteleton. Li ankaŭ transdonis libron, kiu estas donaco de Roland Dupuis.

Denove ni kolektiĝis en la granda salono, kie Lilly Davanger kaj Evald Bendixen prezentis «Åses død». Marit Evanger plane akompanis ilin, kaj poste ŝi kantis «Solveigs sang» kaj «Solveigs vuggevis».

Doris Birkelund legis pecon de Kalevala, kaj post tio ni gaje dancis ĝis la fino. Ni entute travivis amikan plensukcesan feston.

La Esperantoklubo de Bergen kunvenis la 11an de septembro. La programo estis ĉifoje pri feriaj okazaĵoj kaj aventuroj.

Kjell Offerdal parolis pri kongresaj aranĝoj, kaj fine referis la Mondkongreson en Finnlando.

Kristian Sivertsen legis poemon pri la vojaĝo al Helsinki, kaj la alveno al Dipoli.

Åshild Birkenes intervjuis Leonora Sivertsen pri la Mondkongresaj aranĝoj, kaj pri travivaĵoj dum la kongreso. Ŝi ankaŭ intervjuis Doris Birkeland pri la Postkongreso en Turko.

Agnes Henneman kaj ŝia filo Åke montris lumbildojn kaj rakontis pri ilia veturado trans mul-

taj eŭropaj landoj, kaj Lilly Davanger rakontis pri ilia feriovojaĝo al Trondhejmo.

Kunveno okazis la 25an de septembro ĉe Elsa kaj Harald Wærnor.

La sekretario referis la cirkulerojn pri la liga propaganda agado, kaj ni diskutis la skoltan aferon.

Kjell Offerdal referis invitleteron al skoltaj estroj al nia venonta kunveno, kaj ni ekzerce kantis skoltajn kantojn. Ni faris preparojn por la skolta kunveno.

La jugoslavia samideano Zelko Takaĉ pro oficialaj kaŭzoj vizitis nian urbon, kaj ĉeestis nian kunvenon. Ni ĝuis lian ĉeeston.

*Raportis Kr. Svt.*

**Sauda**

Kunvenis la 17. de Sept. ĉe Olga Overskeid. Arthur Bjerke rakontis pri la kongreso en Helsinki, kaj samtempe montris kolorbildojn. Laŭ li la kongreso estis interesa kaj bela manifestacio por nia movado.

La prezidantino Elna Matland laŭtlegis cirkulerojn de N.E.L. kaj ni diskutis la diversajn punktojn. Ni decidis aranĝi lingvajn aktivajojn en ĉiu kunveno ek de nun.

Pri la landa kunveno en Løten rakontis la prez. samtempe mont-rante fotojn kaj gazet-eltondaĵojn pri la aranĝo tie.

Fine okazis solena ceremonio: la prez. donis al Norman Birkeli la ordenon «Pro Merito», la gra-

don kavaliro de la dua klasa. Estis por ni granda honoro ke membro de nia klubo ĉijare ricevis la ordenon de Norvega Esperantista Ligo. *sekr.*

**Haugesund**

La marta kunveno de MARA VENTO, Haugesund, okazis la 27-an. Malfermis la prez. Klara Dahl kaj poste O. Thormodsen faris momor-paroladon pri du klubanoj kiuj forpasis — Ingvald Johannessen kaj Konrad Kallevik. Sekvis referaĵo pri la antaŭa kunveno.

MARA VENTO kunvenis en la kutima ejo de KFUK la 24-an de aprilo. Post bonvenigaj vortoj de la prez. kaj sekretario referis pri la antaŭa kunveno.

La ĉef-punkto de la programo estis parolado kun akompanaj muziko kaj kantado de ĵurnalisto H. Holst Roness. Li prezentis kantojn kaj poemojn pri la printempo, kaj ni aŭdis i. a. poemojn de Wergeland, Gullvåg, Wildenvey, Skjæråsen kaj aliaj. Mem li pianludis kaj kantis kune kun la ĉeestantoj. Estis tre plaĉa kaj gaja programo, kaj la programulo estis forte kaj meritite aplaŭdata.

Poste ni pritraktis klub-aferojn, kaftrinkis, plue kantis kaj interparoladis.

La lasta antaŭferia kunveno de MARA VENTO okazis la 29/5 en la hejmo de ges-anoj Malfrid kaj Sigmund Blikshavn.



Esperantan amikon el via lando. Kolektas kolorajn bildkartojn. Rudolf Ullrich, Box C 7, *Pardubice 1*, Ĉeĥoslovakujo.

La relative multajn kunvenantojn bonvenigis la prez. kiu ankaŭ rakontis pri la distrikta kunveno en Ringøy, Hardanger, kiu estis tre sukcesa.

Sigmund Blikshavn ĝojigis la ĉeestantojn per tre belaj kaj plaĉkoloraj filmoj pri antaŭaj distriktkunvenoj en Hogganvik kaj plue li prezentis interesan kaj belan filmon pri Hongkong kaj aliaj konataj lokoj en Azio (li dum periodo laboris kiel ŝip-elektristo). La ĉeestantoj dankis la programulon per kora aplaŭdo. La kunvenon ĉeestis ankaŭ anino de la Esperanta klubo en Kristiansand S, Maria Kihlman-Hauge. *Rap.*

## Korespondu!

Jurnalistino kaj verkistino deziras korespondi. Lina Gabrielli, Via Luigi Mercantini, 14, I-63100 *Ascoli Piceno*, Italujo.

Multnombraj studentoj kaj anoj de la Popola Universitato el Trapani deziras korespondi. Bonvolu skribi: Esperanto: Casella Postale, 23, I-91100 *Trapani*, Italujo.

Ni ŝatus korespondi kun norvego aŭ norvegino. B. Egon Breitenbach, Difusoria Central do Esperanto, Caixa Postal 2844, *Pôrto Alegre*, Rio Grande do Sul, Brazilo.

Ekonomo 48-jara tre volus havi

14-jara knabo deziras korespondi kun samaĝulo. Kolektas bildkartojn eksterlandajn. Tadeusz Kantor, ul, Lubelska 17/20, *Kraków*, Polujo.

74-jara pensiumita arĥivisto tre volonte interŝanĝus stampitajn poŝtmarkojn kun filatelisto en via lando. Stefan Hochrainer, Johann Straussgasse 24/8, 1040 *Wien*, Aŭstrujo.

### NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

*Turisma Servo*: Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S  
(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 133.29

*La redakcio:*

Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —  
Telefono: 54 727

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*  
Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar